



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 5 Majo, 2014

Kara Leganto, kun granda ĝojo ni informas vin, ke dum lasta nia kunsido, dank'al kvorumo, estis elektita estraro de la Esperanto Societo de Ŝikago por la sekvantaj 2 jaroj (vd p.2). Gratulojn al ĉiuj elektitaj, sukcesan laboron por nia kara Lingvo!

En ĉi n-ro vi trovos ankaŭ interesan kaj disputindan artikolon de Gregoro Dolgin, kiun li prepares kiel prelego, sed pro la malsano ne partoprenis la kunsidon.

Ĝuan legadon!

–La Redakcio

Ĉu Traduki aŭ Interpreti? de Gregory S. Dolgin

Iu oponento demandis min: «Kial vi, Gregory, ne tradukis la kanto-takston rekte?»

Responde: ĉar multaj diverslingvaj ekzemploj evidentigas, ke rekta tradukado de kanto-taksto fiaskis. Klarigo: ĉiuj lingvoj difirencas. Iaj vortoj eĉ strangas por oreloj de alilingvano. En la angla vorto «cold» signifas malvarmon, froston. Sed en la hispana sama vorto «cold» signifas varmegon (angle «heat, hot»). En la japana lingvo vorto «jama» signifas monton, tamen en la rusa vorto «jama» signifas truon en grundo. Jen io pri leksikaj formoj. En E-to verbo «venki» uzeblas en pasinta, estanta kaj futura tempo-formoj. Tamen en riĉa rusa lingvo mankas formo de futura tempo adekvata al «mi venkos!». Se en la rusa kaj la hispana perdi eblas ne nur ion, sed ankaŭ iun (vidu la hispanan: «*Que tengo miedo a perderse despues*»), en Esperanto frazo: «Mi timas perdi vin» estas fuŝita! NPIV: «Perdi (tr) - nevole seniĝi je posedaĵo». Amato aŭ alia persono ne povas esti ies posedaĵo. Ne povas iĝi perdita eĉ liliputano, se li ne elfalis tra truo de Gulivera poŝo. En E-to perdi eblas pomon, monon, apetiton ktp., sed ne homon!

Jen ankaŭ aliaj aŭtoritataj konkludoj: Alternative al rekta traduko ekzistas rimedo uzita precipe de klasikuloj, rimedo interpreti aŭ rekrei! «Poemoj ofte estas netradukeblaj, sed ja rekreblaj. Poemoj sukcese rekreitaj, estas probable troveblaj en ĉiu tradukita literaturo». (Baldur Rag-



narsson – eks-estrarano pri kulturo ĉe UEA. El Antaŭparolo al «Tutmonda Sonoro» de K. Kalocsay). NPIV: «Interpreti – atribui difinitan sencon. Kaj: «Interpretado – transponado de voĉa aŭ skriba teksto».

Pri interpretado kaj rekreado temas Vikipedio, ekz.: el artikolo pri s-ino Rachel Alejandro: «Ŝi konkuris ĉe Internacia Kanto-festivalo en Brasov, Rumanio, gajninte la premion por *Best Interpretation* de rumana kanto».

Pri varioj de alia kanto «Those were the days» temas en ŝikaga ruslingva gazeto «7 дней» (7 tagoj), 48, 2012 (adekvate en E-to): «Eugene Raskin verkis por la kanto aliajn tekstojn». Plue: «Mary Hopkin surbendigis kelkajn variojn de l' kanto en la hispana, franca, itala kaj germana». Originalo de l' kanto estis kaj restas aliaŭtoro.

«*Reklama weekend*», 51, 2012. El la artikolo «History of song *Hal-lelujah*» (adekvate en E-to): «Post kiam tiu ĉi kanto aperis, Leonard Cohen (la aŭtoro) foj-foje plenumis ĝin kun la novaj, verkitaj de li vortoj. Ankaŭ aliaj plenumantoj ŝanĝigadis la kanto-takston, konforme al siaj

scenaj karakterizoj. Kaj Cohen neniam kontraŭis ties ŝanĝojn. Same tio fortigis kaj disvastigis gloron de l' kanto». Mi konsentus plene kun la opinio, se aldoni tie du frazojn: 1. Se interpretoj estus korektaj kaj bonkvalitaj. 2. Se ne forgesi pri aŭtoro de l' originalo.

Oni proponas ankaŭ alian rimedon por konatiĝi kun alilingva poezio. Fama poligloto Willfrid Storkvest devenanta el Skandinavio kaj nun loĝanta en Rusio (adekvate en Esperanto): «Ĉar poezio principe ne tradukeblas, do poezion ekzemple de Arthur Rimbaud necesas legi france, Dante – en la itala, de Ĥajam – en la persa»...

Multaj aŭtoritatoj asertas: «Poeziaĵoj kaj precipe kantoteksto ne tradukeblas!». Ĉar por esprimi ilin en alia lingvo necesas gardi ne nur ideon, enhavon, karakteron kaj stilon de l' origino, sed ankaŭ transmeti saman formon, t.e. saman kvanton de silaboj laŭ ĉiu linio kaj frazo de l' origino. Aliel jenaj tekstoj iĝos ne poeziaj kaj des pli ne kanteblaj! Tamen poezio entute kaj specife kantoteksto endas interpreti. Ĉar interpretante eblas varii sinonimojn kaj nuancojn de l' enhavo. Elektu ian bonan kantotekston en Esperanto. Provu eksperimente traduki ĝin, kaj post la fiasko – interpretu en alia lingvo.

Redakcia Noto: Por montri al vi, ĉu eblas esperantigi kantotekstojn aŭ ne, bv rigardi malsupran tradukon de G. Dolgin mem (el la pola) de sufiĉe fama poemo «*Ostatnia Niedzela*» de Mieczyslaw Fogg.

La Lasta Dimanĉo

Amatin' mia kara,
Mi eksciis amare,
Ke aperis najbaro,
Kiun amas Vi.

Se pli saĝa estas li kaj riĉa,
Se por li tremetas via kor',
Kredu, ho karulino,
Mi ne plendos obstine,
Nur adiaŭos porfine
Antaŭ iri for.

Ne rezignu mian solan peton
Renkontiĝi baldaŭ en ĝarden'.
Malgraŭ via fianĉo,
Nia lasta dimanĉo,
Ŝajnos nia dimanĉo
Kiel en Eden'.

Esperanta Poezio (4): Geraldo Mattos (1931-2014)



Kun bedaŭro ni sciigas vin pri la forpaso de Prof. D-ro G e r a l d o Mattos Gomes dos Santos, 82-jara braziliano, eksa prezidanto de Akademio de Esperanto – cetere, akceptita en la Akademio en 1970, li estis ties dua plej antikva ano. Li estis lingvisto, emerita profesoro de Federacia Universitato de Paranao kaj de Pontifika Katolika Universitato de Paranao – PUCPR (li estas la aŭtoro de la teksto de la Himno de PUCPR). Lia vasta verkaro estas plurfaceta: ĝi inkluzivas lingvistikajn studojn pri la portugala kaj pri Esperanto – kun emfazo pri origino de la Internacia Lingvo kaj ties strukturo. Kunlaboranto de “Fonto”. En la portugala lingvo verkis pli ol tridek librojn pri la instruado de la portugala lingvo kaj pri lingvistiko. Ekverkis Esperantan poezion en 1953. Verkis ankaŭ prozon kaj teatraĵojn. La redakcio planis konatigi vin kun la verkaro de G. Mattos en nia rubriko “Esperanta poezio”, sed iom historie poste. Lia forpaso ŝanĝis la planon: jen estas Lia poemo “Mistero”, unue aperinta en Norda Prismo, 56/6.

Mistero

Tenebro de mistero
vualas homan bruston,
ke hom' jen kultas juston
kaj montras sin humana,
jen -- mensa degenero!
rivelas sin satana
kaj batas, vundas, murdas
kaj mutas, blindas, surdas
por sento homarana!

Pro kio bomo ĵetas
al hundo manĝobulon
kaj povran almozulon
forpuŝas post riproĉo
se panon li plorpetas?
pro kio hom' pro voĉo
orkaĝe birdon gardas,
dum arestiton hardas
la luktokampa loĝo?

En nia brustokerno
sekreto strekas spuron
kaj eble la naturon
imitas homanimoj
en ŝia sentalterno:
ĉu ne la samaj ŝlimoj
produktas jen putoron,
jen plaĉan bonodoron
de rozpetalaj glimoj?

La Lingva Arkivo



M a r t e
T e a t r a
m e t i e j o
“ P i v e n ”
prezentis en Ŝikago premieron de magie inventema komedio pri komunikado, amo kaj Esperanto La Lingva Arkivo. Ĝi estis skribita de premiita dramverkisto Julia Cho (Big Amo, The Piano Majstro) kaj surscenigita de Piven-a lernantino Polly Noonan. En ĝi, brila lingvisto, studanta la pardon de mondaj lingvoj, alfrontas potencialan finon de sia geedzeco, se li ne trovos vortojn por bari foriron de sia edzino. Dume, lia arkiva helpanto ekmutis adorante lin, kaj lia la plej nova esplorobjekto, maljuna paro, kiuj estas la plej lastaj parolantoj de obskura lingvo, rifuzas elbuŝigi eĉ solan vorton de unu al alia.

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

27an de Majo – Martin Mosquera prelegos pri “La Vivo de la Elektrono”: 1350 N. Wells St., Apudas stacioj: Sedgwick (de Bruna linio) kaj Clark/Division (de Ruĝa linio). Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro laŭ (773) 344-2276. Vi rajtas preni vian ŝatatajn ne-E-amikojn kaj trinkaĵon (dolĉakvon, bieron, vinon, vodkon).

22an de Junio – Tradicia E-pikniko

22an de Julio – Temo estos anoncata